ĉe la ~o de Nilo[Z]; *pecoj de la ŝiprompitaĵo alnaĝis al la ~o*[Z]; *sabla, klifa, rifa ~o*; (f) *troviĝi ĉe la ~o de senfundaĵo*[B] (=ruiniĝo); *sur la ~o de la morto vi donas savon al la fremdulo*[Z]. ☛ *rando, surfo, kajo, plaĝo.* **2** (plurale) Lando, kuŝanta apud akvaro: *niaj faraonoj eternigis sian nomon ĝis la ~oj de Eŭfrato*[B]. **~i** (tr). Kuŝi ĉe la ~o de: *la bieno ~is la lagon.* **~ano.** Tiu, kiu loĝas ĉe la ~o de rivero ks. **al~iĝi.** Atingi la ~on, naĝante aŭ ŝipirante. **al~iĝejo.** Loko taŭga aŭ aranĝita por la aliĝo de boatoj, ŝipoj. **super~iĝi.** Elverŝiĝi super la ~o. ☛ *inundi.* **~ŝipo.** Ŝipo, kutime kursanta laŭlonge de la mar~oj. **mar~o.** ~o de maro: *en la urbon de la franca mar~o kunvenis homoj . . .*[Z]; *vento blovis de la flanko de la hispana mar~o*[Z]; *tre multe da greno, kiel la mar~a sablo*[X].

Bord/o Nomo de iaj landoj aŭ landopartoj: *la ~o Ebura* (Eburio, 7°E, 5°N); *la ~o Ora* (hodiaŭ: Ganao); *la ~o Lazura* (parto de la franca Mediteranea mar~o, 7°E, 43°30′N); *Oman~o*; *Somali~o.*

bordel[1]o. Domo, kie la prostituitinoj akceptas la klientojn. ☛ *malĉastejo.* **~isto.** Posedanto de ~o.

***border/i** (tr). **1** Garni per ornamaĵo la randon de tuko, drapo, vesto ks.: *~i kolumon per pelto, ĉemizon per punto.* ☛ *orli.* **2** Garni la randon de io ajn, por ĝin plifortikigi: *~i reton per ŝnuro*; *~i bedon, trotuaron per ŝtonoj.* **~o.** Tio, kio ~as: *~o el galono, rubando*; *~o el bukso ĉirkaŭ bedo*; *~on havis la aperturo (de la tuniko), por ke ĝi ne disŝiriĝu*[X]; (f) *oni vidis la tutan rondan lunon, kiel blue-grizan globon kun ora ~o*[Z].

Bordoz/o Franca havenurbo (0°34′W, 44°50′N). **~io.** Regiono ĉirkaŭ ~o, kun multaj vitejoj. ☛ *Burgonjo, Ĉampanjo.* **~likvaĵo.** Preparaĵo el kalko k kuprika sulfato, uzata por kontraŭbatali fungatakojn sur arboj. **~vino.** Vino rikoltita en ~io. ☛ *ĉampano, klareto.*

bordun/o Bassonora sonorilo, kordo aŭ orgentubo.

Bore/o ⊙ Helena dio de la norda vento. ☛ *Akvilono.*

boreal/a[Z] Rilata al la norda hemisfero, k precipe al ĝiaj plej nordaj regionoj: *~a poluso, latitudo.* ☛ *arkta, aŭstrala.*

boreli/o G. de spiroketoj, agentoj de iaj rekurantaj febroj, la ~ozoj.

born/o=klemo.

Borne/o Plej granda insulo de Indonezio (117°10′E, 0°25′S).

borneol/o Alkoholo el la kamfora serio, $C_{10}H_{17}OH$.

Borome/o. Itala virnomo. **~aj Insuloj** Tri insuloj en la Majora Lago, famaj pro siaj ĝardenoj (8°32′E, 45°54′N).

***bors/o** ✉ **1** Ejo, destinita por regule okazantaj kunvenoj de komercistoj, makleristoj, kasistoj ktp., kiuj tie vendas aŭ aĉetas neĉeestantajn objektojn, precipe valorpaperojn aŭ krudmaterialojn, je kurzo rezultanta el la proporcio de la mendoj rilate al la ofertoj: *~o pri kotono, lano, poŝtmarkoj*; *ludi ĉe la ~o* (=spekulacii); *akcioj kvotitaj ĉe la ~o.* **2** Tiuj vendoj aŭ aĉetoj mem: *la ~o estas firma, malvigla.* ☛ *merkato.* **~a.** Rilata al la ~o: *~a tabelo, kurzo, operacio.* **~isto.** Tiu, kiu profesie operacias ĉe ~o. **bilo~o.** Speciala ~o, kie oni vendas k aĉetas ~ojn. **labor~o.** Konstruo, kie la sindikatoj tenas siajn kunvenojn, centrigas la metiajn kursojn, siajn bibliotekojn, informejojn ktp.

bos/o 1 Elstaraĵo, kruda aŭ prilaborita, lasita sur la ekstera surfaco de ĉiu ŝtono en muro, kiel reliefa ornamo: *rustika, vermosimila, diamantsimila ~o.* **2** ☆ Reliefa desegnaĵo aŭ figuraĵo, farita sur la fono de metalfolio aŭ de ledo per stampilo aŭ cizelilo. **~i** (tr). **1** Prilabori (ŝtonon) per ~o. **2** Cizeli, estigante ~ojn sur la surfaco de metalo aŭ ledo. **~aĵo** Muro, fasado ks, ornamita per ~oj.

boselaf/o Granda, grizblua hinda antilopo, kies virbesto havas mallongajn kornojn (*Boselaphus*).

bosk[2]o. Belaranĝita arbareto en parko: (f) *kontraŭ suno birdoj per grena ~o sin ŝirmas agrable*[G]. **~eto.** Nur kelke da arboj en herbejo.

boson/o Elementa korpusklo aŭ kvantumo, kiu havas tian econ, ke ajna nombro da ili povas esti en unu sama kvantumstato: *fotonoj k pionoj estas ~oj.*

Bospor/o Markolo de Konstantinopolo (29°05′E, 41°08′N).

boston/o Speco de malrapida valso.

Boston/o Usona urbo, kie naskiĝis Franklino k E.Poe, ĉefurbo de Masaŝuseco (71°05′W, 42°22′N).

bostrik/o 1 G. de koleopteroj, boranta galeriojn en la subŝeloj, por tie demeti siajn ovojn (*Bostrychus*). **2** Infloresko, unuflanka cumo, en kiu la flankaj floraksoj formiĝas ĉiam sur la sama flanko rilate al la ĉefakso, tiel formante kvazaŭ ŝraŭbon.

Boŝman/o. Nigra popolo nomada en Suda Afriko.

***bot/o.** Alta leda piedvesto, kiu atingas ĝis genuo aŭ eĉ pli alte: *ledaj, kaŭĉukaj ~oj*; *~oj de ĉasisto, rajdisto, kloakisto*; *najbaro ne*

ĝemas, kiam ~o nin premas[Z]; *la afero ne marŝas per sepmejlaj ~oj* (eksterordinare rapide). **~eto.** Piedvesto meza inter ~o k ŝuo, iom superanta la maleolon. **~isto.** Faristo de ~oj k aliaj piedvestoj: *ĉe ~isto la ŝuo estas ĉiam kun truo*[Z]. **~tirilo.** Aparato, por ebligi al ~portanto detiri mem ilin. **vad~oj.** ~oj kun tre longaj kruringoj, por ebligi vadadon en marĉo, kloako ktp.

botanik¹o. La scienco pri la plantoj. **~i** (ntr). Kolekti k determini plantojn. **~isto.** Sciencisto pri ~o.

botarg/o Ovoj de mediteraneaj fiŝoj, salitaj k sunsekigitaj. ☛ *kaviaro.*

botaŭr/o Birdo el la ordo de pelikanoformaj birdoj, fam. de ardeedoj, kun mallonga kolo kun longaj, hirtaj plumoj (*Botaurus*).

***botel/o.** Longa, ordinare vitra vazo, kun mallarĝa kolo: *la ventro, la fundo de ~o; ~eto da siropo; ~ego da ĉampano; militira ~o* (=lad~o); (analoge) *Lejdena ~o.* ☛ *karafo, flakono, balono.* **~ujo.** Vimenplekta aŭ metala ujo por transporti ~ojn. **~kukurbo**=kalabaso. **en~igi.** Fluigi (vinon) de barelo en ~ojn. **trans~igi.** Verŝi de unu ~o en alian aŭ en karafon. **gut~eto.** ~eto kun speciala kolo, por povi verŝi la likvon pogute. **lad~o.** Soldata aŭ sportista ~o el fera aŭ aluminia lado. **lav~o** Aparato por purigi gasfluon je nedezirata konsistaĵo. **suĉ~o.** ~o, kiun oni provizas per cicumo, por suĉigi infaneton. **ŝpruc~o.** Dikvitra ~o, fermita per valvo regata de levilo, por ŝprucigi likvaĵon sub gaspremo. **varm~o.** Termoso.

Botni/a Nomepiteto de golfo norde de la Baltika Maro (22°E, 64°N).

botrit/o=griza ŝimo.

botrop/o G. de venenaj serpentoj en tropika Ameriko, parencaj al krotalo; havas larĝan kapon, k prenvoston, vivas sur arboj k arbustoj (*Bothrops*).

***bov/o 1** Granda hejmbesto, kies ino liveras lakton, k virseksulo estas uzata kiel jungbruto; kelkaj rasoj estas senkornaj: *~o muĝas; la ~o estas sankta por Hinduoj; jen staras la ~oj antaŭ la monto*[Z] (jen la malfacila punkto!); *oni vokas la ~on ne festeni, sed treni*[Z] (servistoj laboradu!). **2** G. de remaĉantaj parhufaj mamuloj, ordinare kun kavaj, glataj kornoj malantaŭe sur la kapo (*Bos*). ☛ *bizono, bubalo, kapro, taŭro, poefago.* **~aĵo** Viando de ~o: *rostita ~aĵo* (☛ *bifsteko*). **~aro.** Grego da ~oj. **~ejo.** Stablo por ~oj. ***~ido.** Ido de ~ino ĝis la fino de ĝia unua jaro: *rigardaĉi kiel ~ido*[Z]; *~idon mi atendis, infanon Dio sendis*[Z]; *adori la oran ~idon* (=la monon: ➔ Eliro 32); *~ida eskalopo; stufita ~idaĵo.* **~idino.** Idino de ~ino de la fino de ĝia unua jaro ĝis ĝia unua nasko. ***~ino.** Hejma ino de ~o: *eĉ plej nigra ~ino donas lakton nur blankan*[Z]; *~inokula Hera* (kun larĝaj, neprofundigitaj okuloj). **~inisto.** Tiu, kiu prizorgas la ~inojn. **~isto.** Tiu, kiu prizorgas la ~ojn. ☛ *vakero.* **La B~isto** Boreala konstelacio (*Bootes*). **~oviro 1** Taŭro kun homa kapo, en Asirio. ☛ *Minotaŭro, kerubo.* **2** (evi) Vir~o. **grunt~o** Granda, longhara specio de bovo, vivanta precipe en Tibeto (*Bos grunniens*). **ĝibo~o.** Zebuo. **mosko~o.** Ovibovo. **vir~o.** Taŭro. **ekszvir~o.** Kastrita vir~o.

boviste/o G. (*Bovista* Dill. el likoperdacoj) el fungoj kun globforma fruktokorpo sen mallarĝa sterila baztrunketo; la fruktokorpo, kiu estas manĝebla, kiam tute juna, malfermiĝas je maturiĝo supre, ellasante la enhavon de bruna sporamaso. ☛ *likoperdo, polvofungo.*

bovl/o[Z]. Larĝa, duonsfera taso el argilo, fajenco aŭ ligno: *~o por supo, lakto; fingrolava ~o.*

br! **brr!** Onomatopeo imitanta la tremon pro frostiĝo aŭ teruro: *milito, dum kiu oni ne lavas sin tutajn monatojn por perei unu tagon . . . brr!*[B].

Brabant/o Centra provinco de Belgujo (Bruselo, 4°20'E, 50°50'N). **Nord~o.** Suda provinco de Nederlando (5°19'E, 51°41'N).

bracelet²o. Ornamaĵo portata ĉirkaŭ la manradiko, la brako, aŭ la maleolo. ☛ *brakringo.*

braĉ/o Speco de pantalono, portita de Galloj, Ĝermanoj k kelkaj aziaj popoloj.

bradikardi/o Malrapideco de la kora pulsado.

bradip/o[Z] Sud-Amerika mamulo el la ordo de ksenartroj, kun tre longaj membroj trifingraj k fortaj ungegoj, kiu vivas pendante k malrapide grimpante sub arbobranĉoj (*Bradypus*).

bradipepsi/o Malrapida k malfacila digesto.

braĝ/o 1 Ardaj karbetoj restantaj, post kiam la ligno- aŭ karbopecoj ne plu ĵetas flamon. **2** Tiaj samaj karbetoj, estingitaj antaŭ forkonsumiĝo, k uzataj aŭ kiel bruligaĵo, aŭ kiel elektrodo. **~ujo.** Metala cilindra ajura ujo, por teni ardantajn ~ojn k servi kiel hejtilo.

braĥin/o G. de insektoj el la ordo de koleopteroj; vivas ordinare sub ŝtonoj; kontraŭ malamiko ĝi per eta krako eligas nubeton da malbonodora gaso (*Brachynus*).

braĥiur/o[Z]=krabo.